

P A C O kaj J U S T E O O.

Monata revuo de la grupo B r u g g e.Sekcio de Flandra  
Ligo Esperantista

: . . . . . :  
 : Prezidanto : Drs. F.Roose, J.& M.Sabbestraat, 12, Brugge, :  
 : Tel.: 31981. :  
 : Sekretariejo: Roose-De Kersgieter, J.& M.Sabbestr.12, Brugge. :  
 : Propagando : Maertens Gr., Nieuwstraat, 54, Assebroek. :  
 : Poŝtkonto : 291429 - Maertens Greg., Assebroek. :  
 : . . . . . :

K R I S T N A S K O - 1946.

Kristnasko iru for ! Ne plu revenu ! Ne plu venu en nia mezo ! Via loko ne plu estas tie-ĉi ! Vi ne plu estas tolerebla. Estas nevenkebla malamikeco inter nia mondo kaj vi ! La nuna mondo vin elkraĉas ! Sub kia ajn figuro vi prezentas vin, ni malŝatas vin. Kiel bona maljuna vireto kun barbo vi provokas nian mokridemon ! Kiel Jazuinfano vi provokas nian malrespektan kaj malpian kompaton ! Aŭ ĉu vi kredas ke ni estas ankoraŭ tiel naivaj kredi al vi ? Tiam ni estus pli infanoj ol niaj infanoj ! Kiel la dolĉa muziko en la serena silenta nokto vi vane frapas al nia surdeco ! Niaj oreloj nur aŭdas tute aliajn sonojn. Tiun-ĉi nokton ni volas aŭdi nur "tchiou tchiou tchiou" kiun tekston mi ĵus legis en studenta kultura revuo ! Kiel la amoplena sed ankaŭ fortoplena kaj justecoplenta universestro kiu diris la parolon "pacon al tiuj kiuj volas la bonon" vi provokas nian malbenon kaj nian furiozan malamon. Ni iĝas preskaŭ frenezaj pro malamego kiam vi prezentas vin al ni sub tiu formo. Iu flustras al mia orelo "jes, ĉar tre tre profunde en vi, vi konscias kiel fortega li estas".

Ni esperas ke ne iuj stultegaj Kristnakokantoj resoniĝos de el belfridaj sonorilejoj. Ili tamen ne plu kapablas ensorĉigi nin ! Ĉiukaze ni zorgos ke kiel milobla fiparolego aŭ fikantego rezonos el kafejoj kaj aliaj ejoj nia kanto de diboĉo. Nur du kantoj dum tiu nokto decas. Aŭdu, ili estas ambaŭ de Charles Baudelaire : "Abel kaj Cain" kaj "La litanioj de satan".

Oh race d'Abel, ta charogne  
engraissera le sol fumant !

Race de Cain, ta besogne  
n'est pas faite suffisamment !

Race de Cain, au ciel monte  
et sur la terre jette Dieu.

Traduko : Raso de Abel, via kadavraĉo  
grasplenigos la fumantan teron !

Raso de Cain via tasko  
ne estas sufiĉe plenumita !

Raso de Cain, supreniru al  
ĉielo kaj terenĵetu Dion.

O toi, le plus savant et le plus beau des Anges  
O Satan, prends pitié de ma longue misère !

O Prince de l'exil, à qui l'on a fait tort  
et qui, vaincu, toujours te redresses plus fort !

Toi qui, pour consoler l'homme frêle qui souffre  
nous appris à mêler le salpêtre et le soufre.

Père adoptif de ceux qu'en sa noire colère,  
du paradis terrestre à chassés Dieu le Père:

Gloire et louange à toi, Satan !

Traduko : Ho vi, la plej saĝa kaj la plej bela de la anĝeloj;  
Ho Satano kompatu mian longdaŭran mizeron !

Ho Princo de l'ekzilo je kiu oni maljuste agis  
kaj kiu, venkita, ĉiam pli forta releviĝas !

Vi kiu, por konsoli la malfortan suferantan homon,  
lernis al ni miksi salpetron kaj sulfuron.

Adoptopatro de tiuj kiujn en nigra kolero  
el tera paradizo forĉasis Dio-la Patro.

Gloron kaj laŭdon al vi, Satano !

Kristnasko foriru ! Aŭ se vi tamen volas reveni, iru sub la  
tero ! Ne plu aperu ! Por vi revenis la katakombotempo ! En la ka-  
takomboj, jen via loko ! Kaj en la katakomboj ĉiuj kiuj sentas la  
Kristnaskospiriton !

Diru al mi, kie vi povas ankoraŭ aperi sur la tero ? Eble  
estas kelkaj lokoj. Sed ankaŭ tio ne plu longe daŭros. Cetere, estu  
logika ! Ĉu via Disinjoro ne diris : "mia regno ne estas de tiu-  
ĉi mondo" ? Do !

. . . . .

Mi forviŝas la ŝviton de mia frunto kiam mi pripensas tion !  
Terura realeco ! Ĉu do jes, ni en la katakomboj ? Sed ĉu ni kapa-  
blas kuntiri en la katakomboj niajn belegajn gotikajn preĝejojn ?  
Ne ! Mi scias, la nuna mondo zorgas ke ili unu post la alia falas  
en ruinoj. Baldaŭ Kristnasko havos eĉ ne plu unu domon ! Sed mi  
ne kapablas kaj mi ne volas forlasi ilin ! Tiel longtempe kiel  
staros gotika katedralo, ni iros tien tra la sankta nokto, kaj,  
sur tero, ni festos Kristnaskon !

Karaj gefratoj en Kristo, kie vi estas ? Ĉu mi havas anko-  
raŭ gefratojn ? aŭ ĉu mi estas jam tute sola ? al vi mi krias :

" DIBENITAN KRISTNASKON ! "

```

: . . . . . :
: Paco kaj Justeco :
: Monata bulteno - 6a jarkolekto :
: Abonprezoj de la Ia de Decembro 1946 ĝis la 30a de Decem- :
: bro 1947 :
: Enlande : 25 FR. Eksterlande : 30 FR. aŭ 9 intern. :
: respondkuponoj. :
: Po numero : 2 FR. :
: Pagu ĉe : Maertens Gr., Nieuwstraat, 54, Assebroek-Belgujo :
: P.K. 2914.29 :
: . . . . . :

```

FULMOBRILOJ EN LA ESPERANTO MOVADO.

"Parolu en Esperanto "

Dum ligokunveno de Flandra Ligo Esperantista, iu estrarano,  
Cortvriendt, malkonsilis la interparoladon en E° lingvo en publiko.  
Tio aspektas tro "pedanta" aŭ vekas mokridemon. Li konkludis tion  
el la literaturo (?) kiu envenis en la Radioinstitutopoŝtkesto  
okaze de la pritaktado de la demando : "Kion vi pensas pri nece-  
seco de internacia lingvo ?" La aliaj liganoj tamen ne samopi-  
niis, sed nun ni vidas en "Nederlanda Esperantisto" de 21 Novem-  
ber 1946 ke en ĉefartikolo sur la unua paĝo estas defendata la  
sama tezo. Argumento : la verkinto aŭdis kelkajn Nederlandajn  
junulojn paroli en Itala lingvo kaj la kunvojaĝantoj diris pri  
tio - kompreneble kiam la junuloj estis for ! - "afekto". Nu,  
ankaŭ je tiu argumento ni ne cedas. Ankaŭ tiu argumento estas  
maltrafa se tiuj junuloj volis ekzerci je interparolado en Itala  
lingvo; kiu serioza, bonpensanta homo povas kontraŭstari tion ?  
Eble tiuj junuloj estis afektantoj kaj volis antaŭ ĉio igi sin in-  
teresaj. Tio estas alia afero. Oni rapide rimarkas tion al ilia



junuloj ne havis la rajton sekvi instruadon ĉar la gepatroj estis persekutataj pro la Germana rasteorio aŭ pro politikaj konvinkoj. En la regionoj de la landlimoj la Germanoj malpermesis ĉian instruadon por minoritato de 1 miljono da ĉeĥoj.

La laboratorioj ĉie estis detruitaj kaj la bibliotekoj ŝtelitaj.

Post naŭ monatoj granda parto estis riparita.

- V. Ekzistas "gepatrojkomisioj" kiuj helpas en diversaj aferoj kiel ekz. en la organizado de lernejoj.

-----

A T E N T U ! !      Ĉu ni ne alportis ĉiun monaton ion interesan ?  
:--:--:--:--:--:--:      Tion ni daŭrigos ! Pagu tuj abonon. Tio faciligas nian laboron.

=====

E-s-p-e-r-a-n-t-i-s-t-a-j - N-o-v-a-j-o-j .

I. INTERNACIA ESPERANTISTA UNIVERSITATO EN ANGERS DUM AUGUSTO 1947.

Nia movado, denove, vigle vekigas kaj ni, tre ĝojas pri tio. Tre certe la homoj favoras al ideo de internacia lingvo sed, tro multe da simpatiuloj dubas pri ĝia sukceso kaj konsideras ĝin kiel utopio : ili ne sufiĉe ekvidas ĝian praktikan interesecon.

Por al ili, konigi ĝin estas necese, ne nur organizi internacian korespondadon sed, ankaŭ, kio estas pli videbla, interkontaktigi esperantistojn de diversaj landoj kiuj, per Esperanto, povante interkompreniĝi, estos por la malkredemuloj palpebla pruvo de la efikeco de nia lingvo.

En tiu celo la Angers'a grupo organizas Internacian Esperantistan Universitaton kiu okazos dum la venonta Aŭgusto. Pri tio, la grupo jam interkontaktis kun la aŭtoritatuloj kiuj favoras la ideon kaj oni povas esti certaj pri oficiala apogo.

La instruista parto konsistos el elementa kaj perfektiganta kursoj; la mallaciganta, el vizitoj ĉe la tre interesaj museoj de la urbo kaj ekskursoj tra la Loire'a valo kun ĝiaj famaj kaj vidindaĵaj malnovaj kasteloj. Eventuale oni povus organizi mallongan vojaĝon ĝis la Smeralda malbordoj kaj viziti la faman banlokon "La Baule".

La regiono estas sufiĉe pentrinda por interesigi dum unu monato, alilandaj gesamideanoj. Aliparte, por faciligi al tiuj kiuj ne disponas sufiĉe da tempo, la daŭro estos dividita en 2 serioj po 15 tagoj por ĉiu. Oni povos enskribiĝi por unu aŭ ambaŭ.

Por malgrandigi la rĥstadjkostojn, oni organizos komunan vivon : manĝejo kaj dormejo. Por tiuj kiuj dezirus apartan dormĉambron, oni povas ankaŭ havigi ĝin.

La ekzaktaj prezoj kaj pli kompletaj sciigoj estos komunikitaj en taŭga tempo, sed de nunni bezonas scii kiom da gesamideanoj, intencus partopreni tiun Universitaton.

Skribu al ni. Por la Universitato, la adreso estas ĉe F-no NOUAIS, 28 boulevard Descazeaux, Angers.(Maine et L.)

II. ESPERANTO KAJ UNESKO.

Dum kelkaj monatoj la provizora sidejo de la Eduka, Scienca kaj Kultura Organizaĵo de la Unuigitaj Nacioj troviĝis en Londono. (En la cetero de ĉi tiu raporto ni uzos la nomon

UNESCO, la oficiale akceptita mallongigo laŭ la komencliteroj de la Angla nomo de tiu organizaĵo). En Majo 1946 la Internacia Esperanto-Ligo starigis kontakton kun tiu organizaĵo pere de la Brita Esperantista Asocio. Multe da informa materialo estis prezentata, kaj okazis intervjuo.

En la fino de Septembro UNESCO translokiĝis al sia konstanta sidejo en Parizo. Post perkoresponda prezento de novaj faktoj, S-ro E.D.Durrant vizitis Parizon nome de I.E.L. kaj estis akceptata ĉe UNESCO de D-ro Awad, Estro de la Fakoj pri Sociaj Sciencoj, kiam pli da faktoj estis prezentataj kaj diversaj flankoj de la Esperanta movado estis diskutataj. La sekvanta estas traduko de la teksto Anglalingvo interkonsentita la 24an de Oktobro kiel deklaro pri la fakta sinteno de UNESCO rilate al la internacia helplingva demando kaj la Esperanto-movado:

"Estas komprenite, ke estas en la intereso de UNESCO fari pristudon pri ĉiuj klopodoj, kiuj celas al la enkonduko de internacia helplingvo.

"Ĉi-tiurilate UNESCO prezentas en la nuna tempo, kaj verŝajne prezentos dum kelka tempo, neŭtralan sintenon ĉi tiujn klopodojn.

"La Internacia Esperanto-Ligo, nomo de siaj kunlaborantoj organizaĵoj ĉiuspecaj estas informinta UNESCO-n pri la internacia petskribo por Esperanto, kaj jam prezentis preparan informaron. Ĝi daŭre kunlaboros ĝis sia povo por helpi al UNESCO havigi al si ĉiajn informojn rilate al Esperanto, kaj tion faros en tuta kunlaboro kun ĉiuj Esperantaj organizaĵoj, pro kiuj ĝi havas rajton paroli.

"Ĉi tio neniel malhelpos al kiu ajn Esperanta organizaĵo, kiu mem preferas prezenti rilatajn faktojn en sia propra nomo, sendepende de la kialoj, kiuj eble decidigos ĝin tiel agi."

UNESCO estos regule informata interalie pri la progreso de la Petskribo ĝis ĝia fina prezento en komune taŭga momento. Intertempe, ĉi tiu novaĵo estu instigo al ĉiuj Esperantistoj eĉ pli intensigi siajn klopodojn kolekti subskribojn. Estas aparte dezirinde, ke oni ricevu la apogon de eksteraj organizaĵoj per alprenado de rezolucioj laŭ la teksto de la petskribo aŭ en simila senco. Se oni sukcesos en tio, oni estas petataj urĝe sendi plenan raporton kun ĝusta traduko de la rezolucio, se ties teksto ne estas la sama kiel en la petskribo.

Oni sendu la informojn rekte al S-ro E.D.Durrant, 18, Romeyn Road, London S.W. 16, Anglujo, kiu respondecas pri la kolektado de informaro laŭ interkonsentita sistemo por posta prezento al UNESCO.

C.C. Goldsmith,  
Sekretario de I.E.L.

III. 32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO en BERN . (26 Julio -  
----- 2 Aŭg.1947)

1. aliĝokostoj - ĝis	31/12/46	31/3/47	poste
kongreskotizo (svisaj fr.):	25	30	35
por edzino	12	15	20
por malpli ol 20 jaruloj	10	12	15
blindulo kaj kvidanto	0	0	5 Angl. ŝil.
2. loĝado kaj manĝokostoj			
hotelo:ĉio dum 7 tagoj -		luksa	sfr. 205
		komforta	155
		modesta	130
ĉambro ĉe privatuloj; ĉio dum 7 tagoj			120
amasrestejo en kazernoj, lernejoj kun manĝoj en restoracio(dum 7 tagoj)		klaso I	110
		klaso II	85
Bela kaj bona tendkampo je 2 Km. ekster Bern, senpaga.			



Naar het schijnt schonk men aan het Esperanto niet veel aandacht daar men uit erkentelijkheid iets wilde doen voor de Engelsche taal en ten koste van het Fransch. Maar het resultaat van de beraadslagingen lieten alles ongeveer zocals het was, het behoud van het Fransch als een tweede taal door het comiteit aanbevolen evenals het meer gebruiken van het Engelsch.

Veel voorstellingen en schetsen over een naoorlogsche wereld hebben de noodzakelijkheid van een neutrale internationale taal doen inzien. In Ely Culberston's "World Federation Plan" is een der talen toegevoegd aan de "World Vocational Senate" : het oprichten van een speciale commissie om de officieele erkenning en vestiging van een neutrale internationale taal te bewerken, deze als een secondaire taal te laten onderrichten in alle scholen ter wereld en eventueel om de officieele taal van de Wereldfederatie te worden. De internationale Education Assembly in dewelke opvoeders van bijna alle vereenigde naties samenwerken, heeft het volgende in haar aanbevelingen bevat "Een internationale taal uitkiezen en er het onderwijs van aanmoedigen waar het ook mogelijk is, in lagere en middelbare scholen, om de wereldverbinding en samenhang te bevorderen. Om het aanhoudend gebruik van deze taal te verzekeren kan ze aangewend worden in zekere lezingen, radioprogramma's, tijdschriften en bioscoop. Krachtiger methodes om talen te onderwijzen moeten aangewend worden en de talenstudie aangemoedigd". Ter gelegenheid van de 3e Conferentie der internationale Education Assembly in New-York den 13n April 1945 hoorde Dr James R. Angell, gewezen president van de Yalta Universiteit en nu Algemeen Raadgever van de Nationale Radioomroep, handelen over "Radio als een medium van Internationale Cultuurwisseling". Hij wees herhaaldelijk op de moeilijkheden veroorzaakt door het groot aantal talen. Den 8n Mei 1944 pleitte Mevr. Eleonor Roosevelt in de Horace Lincoln School te New-York voor de vestiging van een universeele taal als een hulp voor internationale samenwerking. De bekwaamheid hebben met andere volkeren te spreken is een van de bijzonderste dingen in de wereld, zegde zij".

De meeste vereenigingen en personen die zulks verklaren schijnen onwillig te zijn om het Esperanto te noemen, alhoewel het de eenige levende neutrale internationale taal is. Er is geen gebrek aan klaarheid; in een besluit aanvaard door het 10e Braziliaansch Geographisch Congres, gehouden te Rio de Janeiro, hoort men :

-Gezien de groote voordeelen welke de wetenschap kan oogsten uit het gebruik van een internationale taal;

-Gezien het feit dat het Braziliaansch Geographisch en Statistisch Instituut het Esperanto aangenomen heeft, als een hulptaal;

-Gezien de buitengewone uitslagen bekomen bij het publiceeren van resumés in Esperanto over alle hoofdstukken verschenen in de "Review of the Geographical Society of Rio de Janeiro" en in de "Brazilian Journal of Geography" en ook bij het publiceeren van overzichten in Esperanto, van de "Brazilian Statistical Year Book" en het Esperantoboek van de "City of Salvador";

-Gezien het feit dat voorbereidingen getroffen worden voor het 10e Braziliaansch Esperanto-Confres dat plaats zal hebben in April 1945, en dat dit congres een groot succes belooft te zijn;  
Daürigo en Sekvonta n°.

~~~~~

A T E N T U ! !  
-----

Ĉu ni ne alportis ĉiun monaton ion novan?  
Ebligu al ni fari tion daŭre en la estonteco!  
Pagu tuj vian abonon! Ni redonos al vi pli!

" à " à " à " à " à " à " à "  
" à " à " à " à " à " à "